

SEK-Bulteno



Nº 28; 2010 [1-2]

Boletín Informativo del “Saenzpenja Esperanto-Klubo”

Publicación bilingüe fundada en noviembre de 1990 con el objetivo de informar sobre las actividades locales, nacionales e internacionales relacionadas con la lengua internacional esperanto.



Nia flaŭro

“Lapacho” (lapaĉo) Bignoneaceas, Tabebuia Avellanadae kaj Tecoma lpe
Informojn sur paĝo 3



Una grata visita



*Darío, José Luis, Berna, Tony y Rubén.
Fotografía: Alicia*

El grupo esperantista local recibió con alegría la grata visita de José Luis Scanferlato, saenzpeñense radicado en Turín, Italia.

José Luis conoció el esperanto en año 1988, curso que fuera dictado por Francisco Veuthey en la Sociedad Yugoslava.

Tras haberse radicado en Turín y haber formado su familia, hace 2 años José Luis retomó los estudios del idioma internacional, junto con Darío, su hijo adolescente, quienes se contactaron con el Centro de Esperanto de la ciudad de Turín.

Como era de esperarse, este año el viaje de José Luis no solo fue para visitar a sus familiares sino también para contactarse con los miembros de S.E.K., quienes le dieron una cordial bienvenida en una amena reunión de confraternidad.

El encuentro de carácter informal, tuvo lugar el 11 de agosto de 2010, a las 21hs, en el domicilio de Alicia Aranda y posibilitó, además de un intercambio amistoso, conocer las experiencias relacionadas con el esperanto en nuestra ciudad, nuestro país y el Centro de Esperanto de Turín. ★

El árbol lapacho

Fuente de info: Internet

El lapacho rosado es un hermoso árbol de aproximadamente 20 metros de altura y de 80 cm. de diámetro en su tronco. Pertenec a la familia botánica de las “**Bignoneaceas**”.

Estas especies crecen naturalmente en las regiones montañosas sub-tropicales denominada selva “tucumano-boliviana”, sobre las laderas de las montañas de la pre-cordillera entre 450 y 800 metros sobre el nivel del mar.

En la provincia de Tucumán, en el noroeste argentino, florece a fines del mes de julio y es completamente cubierto por hermosas flores rosado-morado que llegan al final de cada tallo en grupos de 30 cm. aproximadamente.

Las especies de lapacho más utilizadas por el Dr. Meyer fueron el *Tabebuia Avellanadae* y *Tecoma Fabrisi Meyer* (nueva especie científica descubierta por él)

Los frutos son cápsulas de aproximadamente 20 a 30 cm. De longitud por 2 cm. De ancho, aparecen a mediados de septiembre, y están en el árbol hasta diciembre/enero época en que comienzan las lluvias.

La madera es de color amarillo-verdosa, es muy dura y pesada (0,935 kg/dm³) y extremadamente resistente a la intemperie.

El árbol lapacho crece naturalmente en algunos países de sudamérica.

En argentina el nombre popular es LAPACHO, en Brasil es PAU DARCO y en Bolivia es TAJIBO.

Entre todas las variedades, solamente el *Tabebuia Avellanadae* crece en los ricos suelos montañosos de la jungla del noroeste argentino y del sur boliviano.



Flor del lapacho

El resto de las variedades crecen en tierras planas y cercanas al nivel del mar.

En la República Argentina crecen naturalmente en 2 regiones:

1 “Selva tucumano-boliviana” – Especie **Tabebuia Avellanadae**.

Montañas de la provincia de Tucumán, Salta y Jujuy únicamente.

2 “Chaco-paraguayo”– Especie **Tabebuia Ipe**. Pertenecen al área del noreste argentino, Paraguay y Brasil.

Ambas regiones tienen clima totalmente diferente. La selva tucumano-boliviana es sub-tropical, muy húmeda, exuberante y suelo rico en minerales. La zona del chaco-paraguayo son tierras bajas, planas y de suelos pobres en minerales.

A primera vista las especies **Tabebuia Avellanadae** y **Tecoma Ipe** son similares, pero botánicamente presentan diferencias. El Dr. Meyer describe éstas en su libro “Árboles indígenas de Tucumán” (Universidad Nacional de Tucumán – 1947)

Los botánicos americanos cometen un error al definir al lapacho argentino como “*Tabebuia Impetiginosa*” y al lapacho Brasileiro como “*Tabebuia Heptaphyla*”.

El lapacho en el Chaco

En el Informe de la Comisión Exploradora del Chaco, Arturo Seelstrang refiere: "El lapacho es un árbol de grandes dimensiones y uno de los más hermosos del territorio. Tiene la particularidad que en la primavera pierde completamente sus hojas y se cubre de flores rosadas, presentando así una vista muy pintoresca, la que conserva hasta principios de enero, en cuya época vuelve a cubrirse de hojas nuevas. Algunos lapachos tienen flores blancas, siendo éstos más escasos. Su madera es verdosa, dura y sólida, siendo apreciada para toda clase de construcciones." (Seelstrang Arturo: Informe de la Comisión Exploradora del Chaco, Primera Edición: Tipografía y litografía del "Courier de la Plata", Buenos Aires 1878; 2a Edic. EUDEBA 1977).

Por su parte, al describir la flora del Gran Chaco, Luis Jorge Fontana hace la siguiente referencia: "El lapacho es otro de los árboles más valiosos que tenemos, por la excelente calidad de su madera; una especie de bignoniácea del género tecoma; parece que estos árboles estuviesen encargados por la naturaleza para decorar el aspecto monótono de estos bosques tan espesos y enmarañados. Al tratar de este último, nos es grato recordar las bellas palabras del profesor Hierónymus, cuando ocupándose del lapacho dice: El reino vegetal casi no puede presentar un espectáculo más imponente que el aspecto de estos árboles gigantescos, cuando sus ramas negras y deshojadas durante el invierno se cubren en la primavera de millones de grandes flores rosadas o amarillas, que preceden a la irrupción de las hojas. El lapacho es

un árbol del cual se sacan vigas de catorce metros de longitud por treinta y tres pulgadas de diámetro; pero en las partes bajas, donde la humedad es constante, las más veces se pudren en el centro y casi todos los árboles son huecos, pero en los terrenos más altos, por consecuencia más secos, porque desalojan más fácilmente el agua de las lluvias y de las crecientes, hemos cortado muchísimos completamente sanos, y medían doce metros de altura por veinticuatro pulgadas de diámetro." (Luis Jorge Fontana: "El Gran Chaco", Ed. Solar, Hachette, Buenos Aires, 1977, pg. 180)

Nombres Comunes del lapacho: **Ipé, Lapacho, Lapacho Crespo, Lapacho Morado, Tayí, Tayí-hti, Tayí-pirai y Tayí-pirurú.**

Es uno de los árboles ornamentales más hermosos de Argentina, por lo que es utilizado en arbolado urbano y en decoración de parques y jardines.

Florece de junio a septiembre.

Fuente de info: Internet



Lapacho en la ciudad de Resistencia, capital de la Provincia del Chaco

Esperanto kiel energio kaj ne kiel ornamo

La mondo estas nia patrolando kiam nur ekzistas unu lingvo por la komunikado inter la homoj. Ĝi estos tre granda kiam la homo rekonas, ke Esperanto estas portego malfermita por ke la homoj ne sentas sin fremduloj.

Esperanto ne nur estas lingvo sed energio, ĉar ĝi kondukas al la solidareco, frateco, amikeco kaj paco. Per ĝi ni sentas anojn de la mondo, ĉar ni rekonas geamikojn, do, ĝi ne estas fenomeno por detruiri la nacilingvojn de ĉiuj popoloj.

Kiam vi lernas, studas, kaj praktikas Esperanton, vi akiras novan aeron por daŭrigi vivante pro la vivo, ĉar la homoj el la tuta tero komprenos unu la alian, kiu la estonteco povas aparteni al la novaj homoj kiuj realiĝos la granda sonĝo de la homaro.

La personoj kiuj sentas Esperanton en siaj koroj, ili estas esperantistoj, tiam ekkomencas la alian parton de nia vivo por nia elzistado kiel tera homo.

La granda kunsido aŭ festo de la esperantistoj por ke ni revidos multajn el niaj geamikoj estas la tutmonda Esperanto-Kongreso. Tie renkontiĝos centoj da esperantistoj el ĉiuj landoj. Tiam kunsidos nek araboj, nek kubanoj, nek hispanoj, nek francoj, nek ĉinoj, sed nur homoj, kiuj diskutas fratece pere de unu lingvo.

Bonaj esperantistoj estas kiuj pagas volonte kaj kun plezuro sian kotizon, rekomendas la servojn de la lingvo al

ĉiuj, kiuj povas ilin profiti, portas en sia poŝo propagandajn libretojn kaj instruas la lingvon al novaj interesatoj.

Esperanto ne estas ornamo ĉar ni povas uzi ĝin por la komunikado, informado, disvastigo kaj disvolvo.

Ĝi estas movado kie ni povas praktiki vivan lingvon por la kompreniĝo inter homoj kaj ni povas trovi familiojn, amikojn kaj hejmojn en ĉiuj landoj.

Kiel bela estas la mondo kiam geamikoj ĉie bonvenigas vin!

Ni bezonas Esperanton, ĉar ĝi estas parto de la historio kaj naskiĝis kun ni. Ĝi estas amo, pro tio apogi ĝian disvastigon, disvolvon kaj lernadon estos kontribuo al la mondpaco.

Se ni defendas Esperanton, ni savos arbon en la arbaro kie pro senscio de kelkaj homoj kiuj intencos bruligi ĉion, ili detruus ion kion apartenas al la vivo, tiam, ni devas zorgi kaj subteni la semojn de ĝi, por la kreskado de novaj arboj, ĉar la lingvo kiel la movado povas levi la animon, tiel, kiel la floroj povas stimuli revojn.

Lernu, studu, praktiku kaj parolu Esperanton por ke vi povas loĝi kaj eniri en Esperantio!

Rafael Cabrera Espinosa,
prezidanto de Granam Esperanto-Filio
kaj IM de UEA.(CU)

Kelkaj informoj pri Kubo 2010

De la 17-a ĝis la 24-a de julio 2010 okazis en Havano, Kubo,
la 95-a Universala Kongreso de Esperanto.

Por pliaj informoj vidi *Gazetaraj Komunikoj de UEA -Kongresaj Kurieroj*: www.uea.org

Ulrich Brandenburg nova honora patrono de UEA

S-ro Ulrich Brandenburg, la gernana ambasadoro en Moskvo, estis elektita kiel membro de la Honora Patrona Komitato de UEA. La unuaniman decidon faris la Komitato de UEA en sia kunsido en Havano la 17-an de julio.

Ulrich Brandenburg naskiĝis la 12-an de oktobro 1950. Li estas denaska esperantisto. En aŭgusto 2007 li fariĝis konstanta reprezentanto de Germanio ĉe NATO en Bruselo. Poste, pro sia sperto pri la slava mondo kaj pri Rusio, li estis nomumita kiel ambasadoro en Moskvo, kie li deĵoras ekde aprilo 2010.

Post studado de lingvoj en Münster kaj Parizo Brandenburg unue laboris kiel instruisto. En 1980 li komencis sian karieron en la diplomatia servo de Germanio. Li deĵoris unue en la ambasado en Bagdado 1982-1984 kaj daŭrigis en la tiama Sovetunio ĉe la ĝenerala konsulejo en Leningrado (Sankt-Peterburgo) de 1984-1986 kaj ĉe la ambasado en Moskvo 1986-1988. Ĝis 1995 li deĵoris en la Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj, krom 1991-1992, kiam li studis en la Harvarda Universitato. De 1995 ĝis 1999 li gvidis sesion ĉe la administracio de NATO en Bruselo. Reveninte al la Ministerio en 1999 li laboris i.a. kiel Komisiito pri Rusio,



Kaŭkazio kaj Centra Azio kaj kiel vicestro de la Politika Departemento, ĝis sia unua nomumo kiel ambasadoro.

Dum pluraj jaroj Brandenburg aktivis en Germana Esperanto-Junularo, kies prezidanto li estis 1974-1976. Li redaktis ankaŭ la GEJ-rubrikon "pozitive" en "Germana Esperanto-Revuo". En 1974 li havis la ĉefan respondecon pri la organizado de la TEJO-kongreso en sia hejmurbo Münster. Vicprezidanto de TEJO li estis 1973-1975.



*Silvia Rottenberg reprezentis Argentinon en la UK
kaj vizitis Radion Havano-Kubo*

La 95-a UK omaĝis al Nelson Mandela

La inaŭguro de la 95-a UK en Havano koincidis kun la 92-a naskiĝtago de Nelson Mandela. Kun forta aplaŭdo la kongresanaro omaĝis al la Nobel-premiito per jena omaĝmesaĝo:

"Unuiĝintaj Nacioj deklaris la 18-an de julio "Internacia Tago Nelson Mandela", rekone al la kontribuo de la iama Prezidento de Sud-Afriko al la kulturo de paco kaj libereco.

Tiusenca rezolucio estis akceptita en novembro 2009 de la Ĝenerala Asembleo de UN por memori pri la longdaŭra sindediĉo de la Nobel-Premiito al la paca solvo de konfliktoj, harmoniaj rilatoj inter la rasoj, homaj rajtoj, reharmoniiĝo kaj seksa egaleco. Oni komencas noti tiun feston ekde la jaro 2010, kiam la gvidanto de la lukto kontraŭ rasapartigo fariĝos 92-jara. Akceptante la rezolucion, Unuiĝintaj Nacioj esprimis sian estimon al tiu grandulo, kiu (laŭ la vortoj de la Asemblea Prezidanto Ali Treki) suferis por la tuta homaro; kaj ĝi rekonis lian enkarcerigon dum 27 jaroj en la fifama malliberigocentro Robben Island, enmare apud la marbordo de Kaburbo.

Post sia liberiĝo el karcero en 1990, s-ro Mandela fariĝis la unua Prezidento elektita en plene reprezenta demokratia baloto en la post-rasapartigita Sud-Afriko, oficante de 1994 ĝis 1999 laŭ la konstitucio de tiu lando.

Ĉe aranĝo organizita okaze de lia pasintjara naskiĝtago, la ĝenerala Sekretario de UN, Ban Ki-moon diris, ke "Nelson Mandela estas vivanta manifestiĝo de la plej altaj valoroj de Unuiĝintaj Nacioj."

La Komitato de UEA elektis en granda unuanimeco

La Komitato de UEA povis efike eklabori en sia unua kunsido en Havano sabaton, la 17-an de julio, ĉar diference de kunsidoj eĉ en pluraj eŭropaj UK-oj, ĝi havis kvorumon tuj je la komenco. Ĉeestis komence 26 komitatanoj; fine de la kunsido la nombro estis jam 36, nome 32 komitatanoj A, 3 komitatanoj B kaj unu intertempe elektita komitatano C. La ĉefa tasko en la sabata kunsido estis la elektoj. La Komitato voĉdonis per sekreta baloto pri la proponoj de la Elekta Komisiono, kiujn ĝi ricevis jam en majo. Unue estis elektitaj komitatanoj C. Ĉiuj ses kandidatoj sukcesis en la voĉdonado. Por Loes Demmendaal voĉdonis 24, kontraŭ 1 kaj 2 sindetenis; Paulo Branco ricevis respektive 21, 4 kaj 1; Jean Codjo 20, 4 kaj 2; Josep Franquesa Sole 20, 5 kaj 1; Stefano Keller 20, 0 kaj 6; kaj Marcel Delforge 19, 1 kaj 6.

Sekvis la elekto de la Estraro por la periodo 2010-2013. Probal Dasgupta estis reelektita kiel prezidanto per 26 por, 2 kontraŭ kaj 4 sindetenoj. Claude Nourmont kiel vicprezidanto ricevis respektive 26, 4 kaj 2 voĉojn, kaj Barbara Pietrzak kiel ĝenerala sekretario per 27, 4 kaj 1 voĉoj. Same kiel antaŭe, Nourmont plu respondecos pri edukado, kulturo kaj kongresoj kaj Pietrzak pri informado. Loes Demmendaal reelektiĝis kiel estrarano pri financo kaj administrado per 28, 2 kaj 2 voĉoj. Tri estraranoj estas novaj: Maritza Gurierrez pri landa kaj regiona agado (resp. 26, 3, 3), Stefano Keller pri eksteraj rilatoj (24, 3, 5) kaj Amri Wandel pri scienca kaj faka agado (23, 5, 4). Kvankam ne en la tuj antaŭa periodo, Gutierrez estis

=>

estrarano jam pli frue dum unu mandato kaj Wandel dum du mandatoj.

Kiel komitataj reviziantoj estis elektitaj Paulo Branco kaj Marcel Delforge unuanime. Ambaŭ ricevis 29 porajn voĉojn; du sindetenis. Simile elektigis ankaŭ la membroj de la Financa Komisiono. Flory Witdoeck ricevis 30 porajn voĉojn kun 1 sindeteno, Gianfranco Polerani resp. 29 kaj 2, kaj Josep Franquesa Sole 28 kaj 3.

Salutmesaĝo de Louis Christophe Zaleski-Zamenhof

Sinjoro alta protektanto, sinjoro prezidanto, gesinjoroj honoraj gastoj, estimataj gekongresanoj, geamikoj karaj, Saluton al vi, alvenintaj de landoj malproksimaj al la gastama urbo de Havano, alvenintaj por diskuti kaj, sekve, por progresigi la interproksimigon de kulturoj.

Bonvolu aŭskulti ĉi tie kelkajn vortojn de maljuna nepo de Avo eterne juna, Avo kiu nian belan lingvon iniciatis ĝuste por kulturojn interproksimigi. Lingvo ja estas vehiklo de kulturo. Tial, laŭ onidira observo de Ludoviko gapvaganta sur la Bjalistoka vendoplace, malamikeco ekzistis inter malsamlingvanoj sin reciproke ne komprenantaj; malamikeco kaj malkompreno bremsantaj interproksimigon de respektivaj kulturoj de tiuj malsamlingvanoj.

Kontraŭe al la iama Bjalistoka vendoplace, nia

Kongreso Universala estas teatro de kultura interproksimigo kaj ni, esperantistoj, ni de tiu interproksimigo estas la aktoroj. Ne nur pro malekzisto inter ni de lingvaj baroj, sed ankaŭ pro la neŭtraleco de nia lingvo Esperanto, dua lingvo por ĉiuj neniel celante ian ajn nacian lingvon anstataŭigi.

Mi forte deziras, kiel vi ĉiuj, ke la Havana Kongreso estu signifa paŝo sur la vojo de kultura interproksimigo.

Parolado de Julián Hernández Angulo

**Prezidanto de
Kuba Esperanto-Asocio
kaj de la Loka Kongresa Komitato de
la 95-a Universala Kongreso de
Esperanto, dum la Solena Inaŭguro**

Karaj honoraj gastoj,
Karaj gekongresanoj,

95-a Universala Kongreso de Esperanto, Ideo elpensita, ideo proponita, ideo aprobita, ideo kiu fariĝos realo dum tiu ĉi semajno kiel rezulto de la ĉiutaga kaj serioza laboro de la loka kongresa komitato kaj de pluraj kubaj esperantistoj kiuj ĉiam pretis helpi kaj kunlabori.



Foto: Joaquim J. Mariano. <http://www.jjmariano.com/>

Ideo kiu estas omaĝo kaj donaco por la esperantistoj de la kontinento de la pasinta periodo kaj por tiuj de la nuntempo kiuj ĉiutage faris kaj faras por la progreso de nia komuna lingvo. Ideo kiu dekomence kaj daŭre esti subtenata de la kuba registaro pere de la ministerio pri kulturo kaj ties diversaj instancoj.

Ni alte taksas la decidon de UEA venigi la Universalan Kongreson al Kubo ĉar tio ebligas al esperantistoj el Sudaj Amerikaj landoj travivi tutan esperantistan semajnon kaj pli bone konstati la internacian dimension kaj utilon de Esperanto.

Sendube tio diversmaniere impulsos kaj injertos pli da energio kaj entuziasmo al la movado en nia regiono kaj kontinento.

Nome de la loka kongresa komitato, ni petas al ĉiuj kongresanoj adapti la kongresan programon al siaj bezonoj kaj preferoj, ne perdi tempon kaj profiti ĉiujn momentojn por kreskiĝi kiel esperantisto, kiel homo kaj kiel civitano de la mondo.

Konatiĝu kun Kubo kaj kun Havano laŭ viaj ebloj kaj ĝuu la kongresan semajnon.

Koran Dankon.

Salutvortoj de la urbestro de Herzberg

Estimataj landaj, urbaj kaj kongresaj aŭtoritatoj, tre karaj gesamideanoj!

Jam pasis kvar jaroj ek de kiam la urba konsilantaro de Herzberg en Germanio unuanime decidis kromnomi Herzberg “la Esperanto-urbo”.

Ek de tiam Esperanto iel fariĝis la dua oficiala lingvo de Herzberg; multiĝis en ĝi la instruado de la internacia lingvo, granda nombro da esperantistaj naciaj, internaciaj kaj fakaj eventoj gastigis en ĝi, amaso da eksterlandaj esperantistoj vizitis ĝin, nova Zamenhof-monumento

memorigas al miloj da preterpasantoj la kreinton de la supernacia lingvo.

Tio ne estas ĉio ĉar la Herzberga laboro por Esperanto apenaŭ komenĉiĝis. Kiel urbestro de Herzberg - la Esperanto-urbo mi akcentas la valoron de internacia kunlaboro kaj en tiu spirito invitas vin al mia, nome via urbo.

Herzberg subtenas Esperanton: vi subtenu Herzberg per via persona kunagado.

Gerhard Walter

**Urbestro de Herzberg -
la Esperanto-urbo**

REZOLUCIO DE LA 95-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

La 95-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninta en Havano (Kubo) kun 1002 partoprenantoj el 59 landoj, **Konsiderante**, ke Unuiĝintaj Nacioj deklaris la jaron 2010 Internacia Jaro de Interproksimigo de Kulturoj, konstatas

- ke la diverseco de kulturoj en la mondo grave kontribuas al la riĉeco de la homaro;
- ke jam dum 123 jaroj Esperanto kiel neŭtrala lingvo helpas konstrui pontojn inter popoloj kaj kulturoj, kaj

- ke la Universalaj Kongresoj de Esperanto, kunigante homojn el plej diversaj landoj tra la mondo, mem atestas tiun kapablon konstrui pontojn,

Deklaras la deziron de la Esperanto-parolantoj kunagi kun Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko por stimuli komprenemon inter popoloj kaj samtempe protekti la identecon de ĉiuj homgrupoj, kaj invitas Unuiĝintajn Naciojn kaj Uneskon plene eluzi siajn rilatojn kun Universala Esperanto-Asocio por efike realigi siajn celojn.

Herzberg, 24 de julio 2010

La Esperanto-flago en Google

La portalo de *Google* honoris la jubilean datrevenon de Lazaro Ludoviko Zamenhof. La kompanio aldonis la flagon de Esperanto ĉe la vorto *Google*: klakante sur ĝi la leganto trovis liston de la Zamenhof-mencioj en la koncerna ŝtaringvo. La honoro daŭris la tutan diurnon de la 15-a de decembro 2009.



Laŭ informo de la gazeto *Heroldo de Esperanto*, ne ĉiuj lingvaj branĉoj de *Google* en la mondo aliĝis al tiu honorigo: ekzemple neniu anglalingva, escepte de la usona. En Eŭropo honoris i.a. la franca, germana, itala kaj rusa. Inter la nordaj nur la sveda. Neniu el la baltaj landoj krom la pola. En Meza Eŭropo mankis la hungara. Ne la ĉeĥa jes la slovaka, ne la kroata jes la slovena, ne la belga jes la nederlanda. Honoris ankaŭ la bulgara, la rumana kaj la serba: fakte en la landoj majoritate ortodoksaj la honoremo pli grandis ol en la protestantaj. Ekster Eŭropo rimarkindas la ĉina, la korea, la japana. En Latin-ameriko mankis Brazilo sed estis i.a. Argentino kaj Meksiko. La decido de la kompanio evidente dependis de la libervola aliĝo de la diversaj branĉoj, preter eventuala premo de la uzantoj.

HdeE n-ro 16, dec. 2009

Raymond Boré forpasis

Raymond Boré, komisiito de UEA pri Zamenhof/Esperanto-objektoj (ZEO-j), forpasis la 6-an de februaro en Chambéry, Francio. Li naskiĝis la 19-an de oktobro 1925. Boré estis dum multaj jaroj kunlaboranto de Hugo Röllinger pri la registrado de ZEO-j. En 2001, post la morto de Röllinger, Boré daŭrigis lian laboron kiel komisiito de UEA. Boré ankaŭ vizitis multajn ZEO-jn por kompletigi sian kolekton de fotoj pri ili. En sia hejmurbo li atingis decidon de la urbaj instancoj nomi la placon, ĉe kiu li loĝis, Skvaro Zamenhof.

Pro la meritoj de Raymond Boré la Estraro de UEA ĉi-jare premiis lin per Diplomo pri Elstara Agado, sed la sorto ne plu permesis aranĝi ĝian personan transdonon al li. En 2005 li ricevis ankaŭ la Premion Ada Sikorska Fighiera. Boré estis dumviva membro de UEA ekde 1985 kaj delegito ekde 1986. Li estis ankaŭ mecenato de la Asocio i.a. kiel regula membro de Societo Zamenhof kaj ekde 2001 kiel Dumviva Patrono de UEA.

Pro malbona sanstato Boré rezignis kiel komisiito pri ZEO-j fine de la pasinta jaro. La Estraro de UEA nomumis kiel lian sekvanton lian longtempan helpanton Robert Kaminski.

Gazetaraj Komunikoj de UEA, n-ro 362

NdIR: Oni devas aldoni ke s-ano Boré estis kiu sendis monhelpon al SEK, por la panelo de la strato Esperanto. Tiu panelo poste estis detruita fare de vandaloj kaj nun la strato (en kvartalo “Sarmiento”) ne havas panelon indikanta nomon.

Estrara raporto de UEA

Ameriko (skize)

La jaro 2009 estis laborplena por kreskigi la E-movadon en Ameriko, kvankam en tiu vasta kontinento aperas signifaj agaddiferencoj. Por ŝanĝi tiun situacion la Amerika Komisiono de EUA lanĉis la projekton “Esperanto al Ameriko”, kun la celo porti la lingvon al tiuj landoj kie esperantistoj forestas aŭ estas malmultaj. Krom ĝisdate funkcia hejmpaĝo de la Komisiono, ĉiuj LA-oj en Ameriko disponas pri propraj retejoj. (*). Tio ebligis teni dumjare kontaktojn en tiuj landoj kiel Salvadoro, Honduro, Kostariko, Nikaragvo kaj Gvatemalo, por aktivigi izolitajn esperantistojn.

Menciindaj radioj programoj el Rio-de-Janeiro, Havano, Radio Aktiva kaj Parolu Mondo.

Informkrampe estas notindaj la partopreno de meksikaj esperantistoj en la januara Monda Socia Forumo, kie ili havis sian standon, kaj la partopreno de UEA-delegacio en Konferenco de NRO-oj de UN en Meksiko.

Plurlande okazis iniversitataj kursoj de E-o, i.a. en Brazilo, Meksiko, Kostariko kaj Venezuelo kaj la jam 40-a NASK (Nordamerika Somera Kursaro en San Diego, Kalifornio.

Apartan signifon en 2009 havis aktivadoj en Kubo, prepare al la 95-a UK. En Brazilo, Meksiko kaj Kolombio okazis landaj kongresoj kaj asembleoj.

Daŭris la kampanjo de la brazila Kultura Esperanto-Centro, liveranta E-lingvajn librodonaĵojn al interesiĝantoj.

Revuo Esperanto junio, 2010, p. 136

NdkR: Nekredeble **Argentina E-Ligo** ankoraŭ havas problemojn kun sia paĝo.

Esperanto-restoracio en Berno

Ankaŭ la ĉefurbo de Svislando havas sian restoracion *Esperanto*.

Ĝi situas en la kvartalo Wankdorf.

La restoraciestro, kun turka nomo, sed ŝajne el kurda deveno, elektis tiun nomon ĉar li esperas gastigi plej diversnaciajn kaj diverslingvajn klientojn.

Nian lingvon li ne scipovas, tamen la verdo estas bone reprezentata ĉe seĝoj, afiŝoj, manĝokartoj, ĉar li scias ke ĝi estas koloroj de espero.

Tial, oni tuj decidis kunvoki lokajn E-istojn al babila kunveneto, la 15-a de junio 2010.

HdeE, n-ro 8, junio 2010

E-o en lernejoj

Post la publikigo de Leĝoj pri Ĝenerala Instruado, la ebleco instrui E-on en **ĉiliaj lernejoj** kaj gimnazioj estas tute malfermita.

Tiu ĉi ebleco nun dependas de la Eduka Komunumo kaj/aŭ estraranoj de la lernejo aŭ gimnazio mem, kiu devas prezenti projekton por instrui E-on kiel duan fremdan lingvon samrange al la angla.

En **Brazilo**, post la amasa reago de esperantistoj kun subteno al la aprobo de la leĝoprojekto por instigo al la instruado de E-o en brazilaj mezlernejoj, la diputito sinjorino Andreida Zito, denove prezentis sian favoran raporton. La projekto estos denove prezentata kaj voĉdonata en sesioj de tiu temkomisiono kaj sekvos al fina sankciigo de la respublika prezidento Lula da Silva.

ANONCOJ

Forpaso

La pasinta 21-a de majo 2010 forpasis samideano Jorge Suárez, esperantisto loĝanta en Rosario, (Santa Fe).

Vicprezidanto de Rosaria E-Asocio, longtempa aktivulo kaj E-instruisto.

Niajn sincerajn kondolencojn al familianoj kaj geamikoj en tiu urbo.

SEK-Bulteno en la reto

Nia bulteno estas dissendita al la retaj adresoj de esperantistoj en pli ol 30 landoj. Tamen ĝi ankaŭ estas legebla kaj elŝutebla ĉe:

www.gazetejo.org

La Redakcio dankas al Carlos Divizia kiu volonte helpis enretigi nian bultenon ĉe la ttt-ejo *Gazetejo*.

SEK-Bulteno

se distribuye gratuitamene.

Datreveno

La 20-a de aŭgusto de 1989 estis la dato de la fondiĝo de SEK.

Do, SEK festis, per sia datreveno, 21 jarojn da aktivado en nia urbo.

Geedziĝo

La 31-a de julio 2010 okazis geedziĝo de Carolina Quintana kaj Pablo Lizún.

La Estraro kaj membroj de SEK tutkore bondeziras ilin kaj aŭguras feliĉan estonton dum iliaj vivoj.



Atenton!

Se vi ŝanĝis vian poŝtan adreson aŭ ret-adreson bv sciigi al nia Redakcio. Antaŭdankon.

SEK-Bulteno N° 28; Enero-Septiembre 2010 [1-2]

Órgano Oficial del Club Saenzpeñense de Esperanto

Calles 119 y 122, H3700FTT Pres. R. Sáenz Peña, Chaco, Argentina

Redacción: Rubén T. Diaconu Tkachenco, E-mail: rubendiaconu@yahoo.com.ar

Miembro y Delegado local de UEA (*Universala Esperanto-Asocio*), Holanda

Colaboradores: Tony Stacul; Emmanuel Maggiori



Sr/ra: